"Nu, eble ne," Alicio respondis per paciga tono, "sed ne koleriĝu. Malgraŭ ĉio, mi tre ŝatus montri al vi nian katon *Dajna*; vi nepre ekamus la katojn, se nur vi povus vidi *ŝin*. Ŝi estas la plej kara dorlotaĵo en tuta la mondo,"—Alicio malvigle sencele naĝetis dum ŝi parolis—"kaj tiel komforte ŝi murmuras apud la fajro lekante la piedojn kaj viŝante la vizaĝon; ankaŭ tiel bela molaĵo por dorloti sur la genuoj, ankaŭ tiel lerta muskaptisto —— ho, pardonu" denove ekkriis Alicio, ĉar la Muso elstarigis erinace la tutan felon; sekve ŝi estis certa ke ĝi tre profunde ofendiĝis, kaj ŝi rapidis aldoni: "Se estas al vi malagrable, ni ne plu parolu pri *Dajna*."

"*Ni* ne plu!" ekkriis la Muso, kiu tremis ĝis la lasta vostharo. "Ĉu vi imagas ke *mi* volus priparoli tian temon? Ĉiam nia familio malamis la katojn kaj nun malamas, malamindaj malĝentilaj bestoj! Estonte vi jam neniam aŭdigu antaŭ mi eĉ la nomon kato!"

"Tion mi promesas tre volonte," diris Alicio, kaj dume klopodis trovi alian paroltemon. "Ĉu vi . . . ĉu vi ŝatas . . . la hundojn?"

La Muso ne respondis. Sekve Alicio avide daŭrigis:—

"Proksime de nia domo loĝas bela, ĉarma, hundeto, kiun mi tre ŝatus ke vi vidu. Ĝi estas malgranda, helokula rathundo kun longa bukla brunhararo. Ĝi kapablas realporti la aĵojn



forĵetitajn; ĝi petas manĝaĵon
vosto, kaj havas aliajn ĉiuspeca
mi ne povas memori eĉ la duo
apartenas al iu farmisto kiu dir
kapabloj ĝi valoras mil spesmiloj
Li certigas ke ĝi mortigas ĉi
. . . Ho, ve! ve! Denove mi ofe
jen! la Muso naĝas for, for per
tia rapideco ke li faras irante tra l
plaŭdbruon.
Ŝi realvokis ĝin per sia plej do
*kara* Muso, revenu! mi petega
nek hundojn ni priparolos, se al
Aŭdinte tion, la Muso turnis sin
renaĝis al ŝi. Ĝia vizaĝo estis
kolero, pensis en si Alicio), kaj
tremanta voĉo ĝi diris: "Ni naĝ
kaj poste mi rakontos al vi mian
komprenigi pro kio mi malamas
hundojn." Kaj certe estus ma
prokrasti la elnaĝon, ĉar en l
enfalis tiom da birdoj kaj bestoj l
premi sin reciproke. Jen An
Dodo, jen Loro kun Agleto, jen
strangaĵoj, birdbestoj kaj best
naĝis Alicio; post ŝi sekvis la tu
Post kelka tempo ĉiuj atingis
staris kune sur la tero, tre mals

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN